## ISAE-INFORMOJ.

56. **Jarkunveno de ISAE** okazos dum la UK en Munkeno, Germanujo, la 4-11 aŭgusto 1951. Tempo kaj loko aperos en la kongresa programo. Tagordo laŭ la statuto. Komitatanoj kiuj intencas partopreni la kongreson estas petataj sin anonci al la sekretariejo de ISAE.

57. **Mortis** nia membro profesoro A. Cotton, tre malnova kaj konata esperantisto, iama vicprezidanto de la franca Akademio de sciencoj.

58. **Medicina Revuo,** eldonata en Japanujo, povas esti abonata ĉe la delegitoj de ISAE aŭ ĉe la sekretariejo kontraŭ unu ISAE-kotizo de aktiva membro.

59. **Studentoj.** Aperis *La Studento,* internacia studenta gazeto, eldonata de Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejanoj kaj Studenta Esperanto-Klubo, Kopenhago. Redaktoro estas nia delegito s-ro J. Vesterland-Andersen, Bernstorffsvej 78, HELLERUP, Danujo. La gazeto aperos 6-foje jare kaj la abonprezo estas 1 usona dolaro.

60. **Terminologio.** Dipl. inĝ. R. Haferkorn, Germanujo (Luitpoldstrasse 5, (13a) REGENSBURG, U.S. Zone), raportas ke li kompilis kartaron E-G kaj G-E de „Elektroteknika Terminaro", kiu nun baziĝas sur la IEC-vortaro. Speciale li prilaboris la fakon telekomunikado. Ankoraŭ ne ĉiuj terminoj ricevis difinojn. Li proponas ke la terminaraj proponoj estu cirkuligataj laŭ modelo de ISO (Internacia normiga organizo).

D-ro W. J. Nijveld, Nederlando, informas ke li antaŭ kelkaj jaroj ellaboris kemian terminaron nederlanda-esperanta kaj inverse. Ĝi ampleksis ĉ. 4000 terminojn sur kartaro. La materialo nun troviĝas ĉe prof. Waringhien, Francujo, por la ellaborado de nova Plena Vortaro.

Sven Alexandersson.

408.92.004.14 : 3

## ESPERANTO EN LA SOCIA SEKTORO ALVOKO.

En la Universala Kongreso de Esperanto en Parizo 1950 en la sekcio Sciencoj kaj Teknikoj, sub prezido de Prof. D-ro Ivo Lapenna, la efektivigo de sistema kontakto inter esperantistoj kiuj laboras en la socia sektoro, — do personoj kiuj estas profesie okupitaj per sociaj aferoj en iu senco, science aŭ aplike, — estis proponata de kelkaj kongresanoj. La sekcio aklame aprobis la esprimitan ideon.



Post la kongreso la prepara laboro por realigi la intencitan kontakton komenciĝis: komisiono formiĝis kiu ellaboris projekton kaj kies unua tasko nun estas alvoki la interesiĝantojn en la Esperantista mondo por konsideri kaj kune krei bazon por pliaj eboj.

Ĉiun, kiu deziras kunlabori en la praktikado de la ideo „Esperanto en la socia sektoro" aŭ estas inklina doni sian helpon alimaniere ekzemple per montrado de nura atento al la temo, ni invitas sendi nomon kaj adreson kun mencio pri profesia funkcio, soci-scienca, esplora aŭ aplika, al la sekretariejo de la komisiono.

INTERNACIA KOMISIONO
ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO,

D-ro W. Solzbacher, prezidanto; Yonkers N.Y.
C. J. Keur, sekretario, Moerweg 76; Den Haag, Nederlando.
W. A. Gething; Luton, Beds.
Lucien Laurat; Parizo.
F-ino J. Scheerlinck; Bruselo.

301.185.14(048.6)

## SOCIOLOGIO DE LA FAMILIO. *)

Problematiko kaj sistematiko.

Resumo pri enkonduka prelego de D-ro P. J. Bouman, Profesoro ĉe la Ŝtata universitato en Groningen, Nederlando, farita en la ĝenerala kunveno de la Nederlanda Sociologia Societo.

**Esploro.**

La ankoraŭ juna branĉo de la familio-sociologio, al kiu speciale la amerika scienco aldonis valorajn kontribuajojn, estas ĝis nun nur malmulte sisteme esplorita.

Kelkaj ĉapitroj, ekzemple la perdo de la funkcioj de la moderna urba familio, forte tiras la atenton. Aliajn ĉapitrojn oni pritraktis nur parte.

**Priskribo.**

Ankaŭ la sociografia laboro montris neproporcian evoluon kun ofte ne fiksita problemindiko pro kio interalie estis malhelpataj internaciaj studoj sur kompara bazo.

*) Tradukita de C. J. Keur kun permeso de Prof. D-ro Bouman.

**Sistema kaj proporcia agado.**

Koncerne la sistematikon oni povas konsideri jenan dividon:

I. La studo de la familio kiel grupo;
la speciala karaktero de tiu grupa interrilato;
rilatoj inter gepatroj;
rilatoj inter gepatroj kaj infanoj;
reciprokaj rilatoj inter la infanoj.

II. La studo de la diversaj formoj de funkcio-perdo;
Redukto de la familio al pure persona grupa interrilato kaj sekvoj de tio.

III. La studo de la kulturtransdonado per la familio ankaŭ en rilato al la generacio-problemo.

IV. Ĝenerala kultursociologia esplorado.

La problematiko sur ĉiu el tiuj terenoj de esploro oni trapensu pli atente ol ĝis nun. Ankaŭ la sociografia laboro bezonas iomete pli proporcian dividon en diversaj direktoj.





fig. I. Grupa interligo

P = patro
Pi = patrino
I = infano





fig. II. Funkcio-perdo

ed = eduko
p = protekto
rf = religia funkcio
ef = ekonomia funkcio
h = hejmeco

**Interdependoj kaj funkcioj.**

Plue: valora estas la studo de la interdependo de fenomenoj kiujn ni konstatas sur la kvar nomitaj terenoj (I ĝis IV). Ekzemple: laŭ la mezuro en kiu la funkcio-perdo pliiĝas, pligrandiĝas la signifo de la personaj rilatoj en la familia grupo. Tio implicas sur tiu punkto pli intiman kunlaboron inter la sociologio kaj la psikologio aŭ psikiatrio.



Koncerne la funkcio-perdon mem ekzistas ankoraŭ multe da necerteco. La funkcio-perdo povas esti pristudata nur en intima kontakto kun la ĝenerala kultursociologio kiu ĉiam pli grandskale spertas la malutilojn de netaŭga tipologio de la kulturfenomenoj (ioman helpon donas la sociologie bazita etnologio kiun la amerikanoj nomas „socia antropologio").





fig. III. Kulturtransdonado





fig. IV. Kultursociologia esploro

**Sekvo de la tekniko kaj trafiko.**

Apartan sociologian aspekton formas la influo de la tekniko pri kiu estas formulita multe da ne-matura kritiko.

Flanke de la aliiĝo de la laborprocedo kaj la pligrandiĝanta distanco inter hejmo kaj laborloko staras la disvolviĝo de teknikaj helpiloj kies uzo rekte influas la familian interrilaton (biciklo, aŭtomobilo, malvarmiga ŝranko, radio, televido).

**Kulturtransdonado.**

Unu el la plej malzorgitaj partoj de la familio-sociologio koncernas la kulturtransdonadon kiu ankaŭ estas valora por la pristudo de la generacio-problemo. Ĉe tio estas tre grave esplori la influon de la pliiĝinta socia moviĝado.

Finfine ĉiuj menciitaj demandoj kuniĝas en la ĝeneralan kultursociologion kies priskriba esploro troviĝas ankoraŭ en la fazo de la unua orientiĝo.